Jaro V. Septembro, 1923. Numero 1

# BULGARA ESPERANTISTO


| ABONPAGO: por Bulgarlando 30 levoj, por fremdlando: bonvalutaj 60 lv., malbonvalutaj 40 levoj. | MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO | АБОНАМЕНТ: за Бжлгария 30 лв. Обявления: кв см. 2 лева Отделен брой 3 50 лева |
|---|---|---|

Препоржчано от Мин. Нар. Пр. за учил. библ. с окр. № 1870 от 27. I 1922


## En la komenco de ĝrava jaro.

En la komenco de la kvina jaro de sia ekzisto, Bulgara Esperantisto povas noti la plej gravan fakton en la historio de la bulgara Esperanto movado, kiun certe en la pasinteco nur revuloj povis imagi efektivigebla: dum tiu ĉi jaro, nur post kelkaj monatoj, Bulgario kolektos la filojn de la mondo, Sofio estos la urbo de Universala Esperantista Kongreso!

Bulgara Esperantisto estas la unua esperanta organo en nia lando, kiu atingas kvinan jaron de ekzisto. Dum la pasintaj kvar jaroj ĝi seninterrompe notis ĉiam pli kaj pli grandajn sukcesojn Dum ili ĝi respegulis la marŝon kaj la kreskon de la bulgara Esperanto movado. Dum ili ĝi esprimis la spiriton de la bulgara esperantistaro, kiu spirito estis ĉiam batalpreta, agema, oferema, senripoze celanta antaŭen al novaj venkoj, kaj kiu estis esprimita en la lasta numero de la pasinta jarkolekto per nia voko: Neniam plu ekhalto!

Kaj jen, tuj en la komenco de la nova jaro ni notas la plej supran punkton de nia antaŭenmarŝo, la kronon al nia ĝisnuna penego.

Grava jaro, kun bonaj antaŭsignoj.

Granda laboro staras antaŭ ni. Grandaj tagoj atendas nin. En 1924 jaro ni devos akiri la plej grandan venkon!

Do, ni komencu nian laboron kaj atendu ĝiajn fruktojn!

**Ada.**

---

## Заменхофъ въ български преводъ.

### МОЛИТВАТА.

На Тебе, безплътна неведома Тайна,
що владашъ свѣта безконеченъ,
на Тебе, източникъ на истина сяйна,
източникъ на смисълъ всевеченъ;
на Тебе, що всѣки различно рисува,
но всѣки гласа ти въ сърцето дочува,
на Тебъ, Отрицателъ на кървави битви,
днесъ пеемъ молитви!

При Тебъ ний не идемъ съ човекопрезрение,
ни съ догми да споримъ за вѣри —
ний слагаме днесъ навсегда помирени
сърца си предъ Твоитѣ двери;
и съ вѣра, отъ всѣки въ сърцето позната,
ний, братя отъ всички страни на земята,
стоимъ неброими, и млади, и стари,
предъ Твойтѣ олтари!

Красиви създà ни Ти въ плодна природа,
но кръвъ днесъ човека опива,
жестоко връхлита народъ връзъ народа,
братъ брата свирепо убива;
която да си Ти о, Сила предвечна,
изслушай Ти нашта молитва сърдечна:
Ти миръ ниспосли тукъ, отдавна изгубенъ,
отново полюбенъ!

Заклехме се ний да се боримъ безспира,
да съединимъ вси народи;
крепи ни, не давай да паднемъ о, Сила,
пѫтъ труденъ докле се пребroom!
На трудъ непосиленъ дари благослова —
могъщи да бѫдемъ въ борбата сурова,
та диви напади щомъ бй се подйели —
да бѫдемъ ний смѣли!

Зеленото знаме високо ще вдигнемъ —
Добро, Красота то вещае
Звѣздата блѣнувана ние ще стигнемъ
духътъ ни навредъ ще витае.
Ний между народи ще сринемъ стенитѣ,
тѣ съ грохотъ ще рухнатъ навеки, разбити,
и братство, и правда накрай за човека
настà-щатъ довека!

Прев. **Ив. Добревъ.**

---

## Al urbo Tirnovo.

Mi vin revidas, belulo mia kara!
Vi estas ĉiam ĉarmega, alloganta . . .
Kaj via frunto fiera kaj memstara
Ĝi estas ja majesta, reviganta!

Vi naskourbo, vi logas min sekrete
Al via ĉirkaŭajo florĝardeno, —
Al via la river' fluanta malkviete
Sub via bluĉielo de l' edeno.

La lumoj nokte min rigardas;
Al mi parolas ili rakontojn pri l'pasinto.
La rememorojn ja jaluze en kor' gardas
Nimfo kaŝita ĉe la arbara pinto.

Ĉio rakontas al mi pri la pasinta gloro;
Pri reĝoj blankbarbuloj, majestaj kaj fieraj;
Pri malfeliĉoj, jugo, domaĝo kaj doloro,
Pri tempoj de la preĝo, pri tagoj senesperaj.

Kaj pri festenoj, ĝojoj en tagoj de feliĉo,
Kiam soldat' bulgara per laŭroj sin kronadis,
Kiam li estis de la tuta popol' fetiĉo
Kaj kiam lin poeto en gloro prikantadis

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Ĉio lacigas min. Mi vagas sen haltado,
L' aeron spiras mi profunde sen satiĝo . . .
Adiaŭ, krias mi, adiaŭ! Ĝis vidado! —
Kaj de l' poemo sentas en koro la naskiĝon.

V. Tirnovo, 12. VIII. 1923.

**P. Jordanov.**

---

# El „LIBRO DE LA ENIGMOJ".

de NIKOLAJ RAJNOV.

La senmorta Iŝtaro, diino de l' Amo kaj Malĉasteco, unufoje rigardis sin en la akvo de Tigro. Rimarkis ŝin Nergalo, dio de l' morto kaj forgeso.

— Kial vi estas nuda? li demandis ŝin.

— Mi estas nuda, ĉar mi estas bela. Kaj ja ĉia koketeco estas hontema porti vestaĵojn

— Vi logas — respondis Nergalo — la korojn de la junuloj per via nudeco, kaj ili ekdeziras virinojn.

— Kial ili ne ekdeziru? respondis Iŝtaro. — La beleco estas naskita por amo kaj ĝuado. Ĉu estas peko nutrante malsatulon kaj trinkigante trinkemulon? Miaj belegaĵoj malliberigadas la koron kaj faras senmorta la momenton de rapida ĝuo: mi donacas al la junularo guton da Eterneco ĉiumomente.

Tiam Nergalo formetis sian falĉilon apud Tigro, demetis sian nigran diademon alproksimiĝante la diinon:

— Mi volas vin! diris la dio de l' morto kaj forgeso al ŝi. — Nur mia vi ne estis ankoraŭ: mi volas vin.

Sed Iŝtaro forkuris de la ĉirkaŭprenoj de l' malserena amanto kaj diris de malproksime al li:

— Ĉu mi ne estis via? Al kiu mi apartenadis ĝis nun? Miaj vesperoj estis ĉiam vesperoj de l' morto, kaj miaj matenoj — matenoj de l' forgeso. Demandu la enamiĝintojn — kaj ili konfesos al vi. Sed vi ne konas vian edzecon kun mi, ĉar la vesperoj, pasigitaj en miaj ĉirkaŭprenoj, ŝajnas Senmorteco, kaj la matenoj de mia edzineco ŝajnas neforgeseblaj. Ĉu ankaŭ vi, Nergalo, suferas la erariĝon de ĉiuj enamiĝantaj? Mi ekpensos, ke eĉ vin mi delogis.

— Ne! respondis malafable la dio. — Sed kiam mi vidis vin, mi forĵetis mian falĉilon kaj demetis mian diademon, tial mi perdis la kapablecon mortigi kaj forgesi. Sciigu min, sincere, senmorta Iŝtaro, kial ĉiu, kiun vi rigardus, ĵetas sian tranĉilon kaj demetas sian kronon?

La diino de l' Amo kaj Malĉasteco silente ekrigardis Nergalon, entrempis sian ĉarman staturon en la klarajn ondojn kaj fandiĝis en la akvoj de Tigro kiel blanka nubo. Kaj sur la glata akvosupraĵo de l' riverego montriĝis sennombraj akvovezikoj, kiuj rigardadis Nergalon kiel sennombraj okuloj de viroj kaj virinoj, kiuj trovis sian pereon en la trompema akvoturniĝado de Iŝtaro.

Pleven. Esperantigis **D. Borisov.**

---

# Rideto

(Novelo).

Kiam Franz Rodewald post multemonataj vojaĝoj en fremdaj landoj, revenis en sia hejma urbo, li sciiĝis, ke fraŭlino Gabrielo Gisius, la artistino, estis doninta sian jeson al la skulptisto Mario kaj ke tiuj du edziĝos tuj kiam kun la fino de la teatra sezono por Gabrielo komencos tempo de ripozo kaj libereco.

Franz Rodewald sciis, ke la skulptisto Mario, lia amiko de juneco, multe da jaroj vane klopodis gajni la inklinon de Gabrielo, ke ŝi pli ol unu fojon rifuzis lin kaj ankoraŭ antaŭ nelonge havis pasian rilaton kun juna nobelulo, kiu dum la vintro estis veninta en la urbon de siaj bienoj. Tiu juna nobelulo, vere, denove estis malaperinta el la urbo kaj ŝajnis, ke Gabrielo estis multe suferinta pro la pasio je tiu bela facilanima homo. Ĉar, tiel oni rakontis al Franz Rodewald, ŝi entute retiris sin de ĉiuj geamikoj; oni diris al li ke ŝi ne estis videbla alie ol sur la scenejo; ankaŭ tie ŝi havis en sia arto trajton de suferado kaj timema kaŝado, kiu por ŝia pasioplena naturo ĝis tiam ne ekzistadis.

Unu tagon la skulptisto Mario estis veninta el Parizo, kie li multe da jaroj estis vivinta severan laborplenan vivon. Ĉiuj sciis ke la neo de Gabrielo estis tiam forpelinta lin. Tiom pli malmulte oni komprenis, ke malmulte da tagoj post lia reveno, Gabrielo, kiu apenaŭ estis vidinta lin, fariĝis lia fianĉino.

La unua iro de Franz Rodewald estis al Mario, lia malnova konatulo. Li trovis sian alie tre trankvilan, eĉ iom melankolian amikon plena je feliĉo, kiu kvazaŭ bruladis el li, kaj en konfuza ĝojo kiel infano, kiun oni superŝutis per donacoj.

„Mi ne scias, mi ja nun ne scias“ li respondadis al la demandoj de la amiko, „mi ne scias, kial ŝi min preferas post tiom da jaroj. Kaj mi sentas, ke ŝi amas min. Ĉar kial ŝi prenus min, ŝi, kies vivo estas tiel brila kaj variita?“

„Sed ĉu dum la jaroj, en kiuj vi estis disigitaj, vi estis ligitaj per korespondado?“ demandis Franz Rodewald.

„Ne. Ni estis sen ia rilato. Tri jarojn. Mi ja havis nek kuraĝon nek esperon post la rifuzo de Gabrielo. Mi venas tien ĉi por prepari mian ekspozicion, ricevas leteron de Gabrielo. Mi revidas kaj — gajnas ŝin. Kio en ŝi okazigis tiun ŝanĝon, mi ne scias. Kiu konas la vojojn de la koro? Mi nur scias, ke mi posedas Gabrielon kaj ke mia vivo nur nun estas perfekta. Sed iru vidi ŝin vi ja estas amikoj de junaj jaroj. Eble vi ekscios tion, kio al mi, kaj eble ankaŭ al ŝi, estas nekonata".

Franz Rodewald sidis antaŭ Gabrielo Gisius en la verda teoangulo de ŝia ĉambro La taga lumo perdiĝis en arĝenta, varma krepusko. La vizaĝo de Gabrielo estis delikata, sed serioza, kaj briletis dolĉe kiel la bukedo de blankaj rozoj, kiuj staris en larĝa taso sur la arĝentkolora silka kovrilo.

„Vi demandas min kiel tio fariĝis? Jes, al vi mi tion volonte rakontos, Franz, sed Mario ankoraŭ ne devas scii ĝin. Ĝi ankoraŭ ne estas por li. Li kredu ankoraŭ ke fajra amo min puŝis al li. Li devas certiĝi je mi post la jaroj de sufero pro mi.

„Vi certe aŭdis pri mia rilato kun la juna grafo, ĉu ne? Ne, mi certigas vin, ne doloras min paroli pri ĝi. Ĝi nur estis febro kiu ne lasis post si alian memoron ol profundan laciĝon. Mi havis pasion por la grafo, senpripense, senkritike. Mi ne havis volon por kontraŭstari ĝin Li min posedis kiel neniu alia viro. Sed ĉu vi kredas ke li min amis? Li amis en mi nur sin mem, sian vantecon, sian viran triumfon ke la fama Gisius estas lia amatino kaj mi ne scias kion. Sed, kredu, li per ĉiu vorto, eĉ per ĉiu kareso min ofendis, min vundadis. Por li ne ekzistis, mi kredas, diferenco inter mi kaj iu ajn sensignifa ĥoristino. Tio ne estis pro malbonvolo de lia flanko, ne li ne povis alion fari. Eĉ kiam li tenis min en siaj brakoj, mi malgraŭ mia fameco estis por li pli malproksima ol se ni estus vivintaj sur malsamaj planedoj.

„Li disiĝis de mi same kiel de amikino kun kiu li estus facilanime travivinta kelkajn tagojn. Nenia konscio en li ne ekzistis pri tio, kion li estis ricevinta kun mia sindonemo.

„Mi restis kun malplena koro, en kiu nenio alia vivis ol kolero kaj malestimo por la viroj, kiuj nenion scias pri ni, eĉ kiam ni estas al ili donitaj.

„Unu matenon mi ricevis leteron de mia juna frato el Parizo. En tiu letero li rakontis al mi mirindan okazintaĵon. Sidante en kafejo li sentis sin observata de tute nekonata homo sidanta je la apuda tablo. Tiu fremdulo, skribis mia frato, post longa ŝanceliĝo, alproksimiĝis al lia tablo kaj diris proksimume la jenajn vortojn: Senkulpigu min, sinjoro ke mi observadis vin. Vi devas esti frato de Gabrielo Gisius Vere viaj vizaĝoj estas tute malsamaj, sed ĵus kiam vi ridetis — mi ne povas trompiĝi — mi vidis la rideton de Gabrielo Dum la sekvanta interparolo montriĝis poste ke tiu homo, kiu estis rekoninta mian fraton, estis Mario.

„Kiam mi legis tiun rakonton, mi kredis senti dolĉan vivigan baton kontraŭ mia muta koro. Vi scias, Franz, kiel malsamaj

estas mia frato kaj mi. Neniu kredus nin gefratoj Nun li — Mario — kiel profunde devis koni min, kiel profunde li devis ami min, por trovi mian rideton sur la lipoj de mia frato! Tie estis mia hejmo, mi sentis ĝin senkontraŭstare kaj skribis al li, ke li venu".

Tradukis el germana lingvo **G. Aktarĝiev.**

---

# Есперантската кооперация.

По време на конгреса в Тжрново на конгресистите бе раздаден позив от основателите на новата есперантска кооперация за записване членове на сжщата. Такива позиви, заедно с молби за членство, са разпратени на сжмишлениците и по пощата.

Какво може да спечели есперантското движение в Бжлгария с основаването на подобна кооперация и заслужава ли вжобще подкрепа това новоначинание? Подобен вжпрос наверно мнозина са си вече задали. Не ще говорим за тези, които се држжат отрицателно спрямо кооперацията, тжй като това држжане не е основано на принципи, а на лични сжображения, които не трябва да влияят на движението ни.

За да можем да разберем, дали кооперацията би била от полза за есперантското движение у нас, трябвало би да знаем, какво ще бжде нейното отношение спрямо единствения представител и защитник на това движение — Бжлгарското Есперантско Д-во.

Трябва да знаем, дали тази кооперация, тази нова есперантска (вече економическа, не изключително идейна) организация ще работи в сжгласие или в разрез с бжлгарското Есперантско Д-во. Знаем ли това, ще знаем, дали тази нова организация ще донесе или не полза за есперантското движение у нас.

Отговор на този вжпрос дава самият устав на кооперацията. Според устава целите на кооперацията са: издаване книги на и за есперанто и материална поддржжка на организациите, които пропагандират Есперанто. Втората цел се реализирва с друга точка от устава, която гласи, че 50% от чистите годишни печалби на кооперацията се предават на разположението на бжлгарското Есперантско Д-во. От това става явно, че кооперацията не само че ще работи в сжгласие с бжлгарското Есперантско Д-во, но че се явява в подкрепа на последното, като му о т д е л я  п о л о в и н а т а  о т  п е ч а л б и т е  с и. Значи всеки успех на кооперацията ще бжде успех и на Бжлгарското Есперантско Д-во, следователно и на целото есперантско движение в страната ни.

Може някои да вжзразят, че понеже д-вото е започнало вече издаването на сжчинения за и на есперанто, то кооперацията би се явила като негов конкурент и би му пречила. Подобно твжрдение, ако то сжществува, е напжлно неправо-

Пжрво. Средствата на д-вото са тжй ограничени, че за джлго време то не би могло да мисли да издаде нещо повече от учебника, който е издало, като дочаква изчерпването на едно издание, за да предприеме друго. Когато кооперацията, след като сжбере по-голям капитал, би предприела издаването на други издания. В това отношение не само че не може да има конкуренция, но напротив, подпомагане. Яви се нужда, напр. д-вото да издаде някое важно сжчинение, а нема средства. Вместо да се правят позиви до сжмишлениците за временни заеми, кооперацията сжс сжбран от сжщите сжмишленици капитал ще се нагжрби с това издание.

Второ. Д-вото не се е отказало и не ще се откаже от правото си да прави издания за своя сметка. Стига да разполага с нужните за това средства. И тези средства то ще добие посредством кооперацията, като половината от чистия приход вземе и употреби за нуждите на пропагандата, а другата половина ще остане у кооперацията за усилване фонда на есперантското издателство у нас. (Печалби не се раздават, сжгласно устава на кооперацията, вместо печалба — по евтини издания).

Трето. За пречене и конкуренция не може и дума да става, като се знае, че основателите на кооперацията са известни на цялото бжлгарско есперантство дейци и защитници на есперантското движение, че почти всички членове от управителния сжвет на кооперацията са членове в Централния Комитет на бжлгарското Есперантско Д-во, джлгогодишни ржководители на движението кжм блескави победи, издигнали бжлгарското есперантско движение високо в очите на есперантистите от цял свят, хора, които бжлгарските есперантисти години под ред са удостоявали с доверието си, поставяйки ги на чело на есперантското движение в Бжлгария.

Може ли някой да допусне, че имено тези ржководители на есперантското движение у нас ще сжздадат пречки за това движение? Това, естествено, е немислимо. Есперантското Кооперативно Сдружение се явява като материален помощник на Бжлгарското Есперантско Д-во, като средство за постигане на още по-блескави победи за движението ни. Затова то заслужава най-широката подкрепа на всеки бжлгарски есперантист! Явно е за всеки, че тази кооперация е неразделна част от Бжлгарското Есперантско Д-во — тя не е нищо друго, освен Тжрговски отдел от последното. Само условията, в които работим, налагат сжздаването на отделна организация, сжс специален устав.

Прочее, ни един есперантист вжн от кооперацията! Всеки бжлгарски есперантист трябва да запише най-малко един дял от кооперацията! Само този е добжр есперантист, който даде подкрепата си на Тжрговският отдел на бжлгарското есперантско дружество.

*От Управ. Сжвет на Кооперацията.*

# Ivan Dobrevski.

Malproksime de ni estingiĝis la vivo de unu el niaj plej bonaj samideanoj.

Sendube la partoprenintoj je la oka bulgara Esperanto-kongreso (1921) memoras la junan viron, kiu, per nelaŭta, sed emocia voĉo, simple kaj kortuŝante parolis pri la vivo de nia same neforgesebla samideano Nikifor Hristoskov. Por Dobrevski la vivo de tiu esperantisto estis fariĝinta kulto, li klopodis kolekti ĉiujn dokumentojn pri lia vivo, kaj al li nome ni ŝuldas la plej multajn informojn pri tiu ŝatinda bulgara esperantisto, kies vivon Dobrevski montradis kiel ekzemplon.

Neniu tamen supozis, ke tiel frue venos la tempo, kiam ankaŭ Dobrevski foriros el niaj vicoj kaj pri lia vivo mem ni kolektos informojn, por montradi ĝin kiel ekzemplon al la novaj esperantistaj generacioj.

Ivan Dobrevski estas naskita en vilaĝo Muhovo ap. Pirdop. Li oficis en Sofio ĝis 1922, kiam li, dum la aŭtuno, premata de la ne plu tolerebla ekonomia situacio en nia lando, revanta labori ĉe pli favoraj cirkonstancoj kaj povi ŝpari ian sumeton, por daŭrigi sian studadon en Germana universitato, ekkredis la trompan propagandon de la komercistoj de homsortoj kaj forlasis sian patrolandon, por serĉi ŝancon en la malproksima Argentino.

Ankoraŭ la unua paŝo en la „tero benita" montris al li — kiel al ĉiuj aliaj samsortuloj — ke li estis kruele trompita. Post unu monato da senlaboreco, suferante grandan mizeron, li forveturis al Urugvajo, por tie serĉi pandonan laboron. Tie li trovis laboron en unu viandfabriko, en la fakoj de la „malvarmigado". Tie inter la glacioj li devis labori dum 12—14 horoj tage — kio superis liajn fizikajn fortojn.

En Montevideo li eniris la rondon de la lokaj esperantistoj. Per sia inteligenteco kaj dolĉa karaktero li altiris baldaŭ al si la simpatiojn de ili. Ili ekpenis trovi pli konvenan laboron por tiu samideano, kiun ili ekamis. La estiminda samideano en Montevideo, s-ro Enrique Munes (Munjes) promesis preni lin kiel oficiston en sia privata banko. Tio plenigis lin per kuraĝo, sed — malfrue jam! La trolaciga laboro en la malvarmigejo donis al li fortan bronkiton, kaj baldaŭ la ftizo trovis neston en la brusto de tiu granitvola viro. Anstataŭ en la bankon, li devis eniri malsanulejon. Forta malsano en la gorĝo, kiu ne permesis al li ricevi jam nutraĵon en la lastaj tagoj, rapidigis la laboron de la ftizo.

Kaj la 25. junio, en la malsanulejo de Montevideo, la morto rabis sian viktimon . . .

Tiujn informojn pri lia suferado kaj lia morto ni ricevis de samideano Vladimir Marĉev (el Ajtos, nun en Buenos Ajres), kiu en sia letero skribas interalie la sekvantajn kortuŝantajn vortojn:

„Pacon kaj trankvilecon al via restaĵo, kara samideano Dobrevski! Kun okuloj malfermitaj pro sopiro al la naskolando, kara,

vi foriris, sed vi foriris samtempe kun la granda kredo, ke la ideo, por kiu vi laboris, kaj kiu dolĉigis viajn lastajn minutojn, doninte al vi en la malproksima lando kunsentemajn samideanojn, venkos nepre. Kiu vin konas, tiu ne dubas, ke vi estis dum via vivo enkorpiĝo de tiu ideo, kaj via spirito subtenos nin, la restintajn batali kaj atingi la venkon!"

Ni devas citi ankaŭ la sekvantajn liniojn el la letero de s ano Marĉev:

„La supredirita samideano Munes prizorgis multe la flegadon de nia kompatinda amikoDobrevski.Li vizitadis lin komence en lia loĝejo, kaj ankaŭ li aranĝis lian translokigon en la malsanulejon per aŭtomobilo, akompanante lin. En la malsanulejo li ne ĉesis vizitadi lin kaj atentigadi la kuracistojn pri li ĝis la lasta horo.

„Dankon al tiu ĉi atentema kaj sindona samideano!"

Ni ankaŭ el nia lando direktas nian varman dankon al la malproksima urugvaja samideano Munes, kiu kiel vera esperantisto, dolĉigis la lastajn momentojn de nia malfeliĉa kaj neforgesota Dobrevski.

---

# Letero de S-ro Jon Giuglea al la Prezidanto de BES.

„Komuna laboro venkon alportas".

Tre estimata Sinjoro Prezidanto,

Devo estas por ĉiu, danki al persono helpinta.

Okazo por danki alvenis ankoraŭ unu fojon al ni, rumanaj esperantistoj, kiuj al vi, bulgaraj esperantistoj, estas treege ŝuldaj por via grava helpo kaj apogo al nia poresperanta laboro kaj klopodo por disvastigo de nia benata lingvo kaj ĝia ideo en Rumanujo.

Mi diras: „treege ŝuldaj", kaj vere estas tiele, ĉar, se nia afero estas favore rigardata kaj akceptata de diversaj sociaj rondoj, tion ĉi ni ŝuldas plejparte al via efektiga subteno per la partopreno al niaj kongresoj, vidigante tiamaniere, kiel nia lingvo estas vivaĵo kaj tuja ilo por interpopola interkompreniĝo.

Mi diras: „treege ŝuldaj", kaj vere, ĉar post ĉiu kongreso nia, komence de la I-a en 1909 — sub la konduko de nia neniam forgesebla D-ro G. Robin — kiu kongreso signifis la komencon de rumana vere publika batalado, la afero esperantista gajnis novan forton, novajn subtenantojn kaj niaj vicoj plidensiĝis. Sed la kialo de tiu ĉi kreskado de la afero estas nur pro vidigo de la estanteco, kaj tio estis vidigata per via ĉeesto multenombra en niaj kongresoj.

Vere estas, ke enlanda movado, konscie estrata, alkondukas finfine al sukceso, sed ankaŭ nerifuteble estas, ke por batalado kiel nia, kies efiko neniel bone vidiĝas nur nacie, sed per helpo

de aliaj popoloj, apogo eksterlanda estas certa antaŭenpuŝilo, kiu certigas nepran sukceson. Tia apogo estas la partopreno de vi, bulgaraj esperantistoj, en nia rumana esperantista movado.

Kaj por tiu ĉi laboro vi estas ĉiam pretaj. Nenio kontraŭstaras vin. Al nia alvoko via koro esperantista ĉiam estas preta, ĉar, nediferencante vian enlandan movadon de nia enlanda, vi konsideris ilin ambaŭ same indaj rilate al via devo de subtenado.

Laŭ tiu ĉi vidpunkto, via apogo alportita al nia propoganda laboro estas ne nur treege grava, sed, laŭ mia opinio, tute netaksebla, ĉar la plej bona rimedo por konvinko ne estas la parolo — kiom bela aŭ prava ĝi estu — sed la fakto; kaj vi vidigis faktojn, kiujn ni bezonis.

Konsiderante la suprediritajon kaj respondante al interna sento de ĉiu rumana esperantisto, mi — kiel unu el la malnovaj rumanaj esperantistoj, kiu ĝuis la unuajn momentojn de la efiko de via apogo, kiel esperantisto, kies animo estas ravita de via esperantista laboro — mi sentas fortan sentobolon en koro mia por esprimi dankojn senfinajn al la tuta bulgara esperantistaro, por ĉiuj oferoj kaj apogo, faritaj por helpi nian movadon esperantan en Rumanujo.

Tial, estu permesate al mi esprimi ankaŭ nian dankemon kaj promeson pri sama respondo al via alvoko.

Fine, mi bondeziras al vi ĉiuj sanon por povi labori dum estonteco kaj ĝui belajn tagojn de prospero kaj de la venko de nia homama paca idealo.

Kaj nun, ĉar maleble estas konigi persone al ĉiu bulgaro partopreninta bulgarajn karavanojn al niaj kongresoj en Rumanujo, kaj al ĉiu bulgara esperantisto, partopreninta anime, spirite, ilin, mian dankon kaj dankemon, mi petas vin, tre estimata Siujoro Prezidanto, ke vi konigu tiun ĉi leteron per ĝia publikigo en „Bulgara Esperantisto".

Salutante per vi la tutan bulgaran esperantistaron je la nomo de la rumanaj esperantistoj, mi petas, bonvolu akcepti sinceran manpremon de rumana esperantisto.

Ĝis revido en Ruse!

Bukureŝto, 5. VIII. 1923. **J. Giuglea.**

---

# Vortoj de la unua apostolo.

De s-ro Hr. Popov, honora membro de Bulgara Esperantista Societo, ni ricevis la sekvantan leteron:

„Tre kortuŝita de la akto de l' X-a Bulgara E.-Kongreso, kiu proklamis mian modestan personon honora membro de la Bulgara Esperantista Societo, mi tutkore dankas.

„Kiel unua apostolo de la lingvo internacia Esperanto en nia lando, mi plenumis kuraĝe mian devon. La hieraŭa infaneto hodiaŭ estas bravulo, batalanta kaj venkanta siajn malamikojn.

„Sidante en mia rezerva pozicio, mi ĝoje observas niajn batalantojn kaj mi admiras la akiritajn de ili sukcesojn, preta ĉiumomente forlasi mian pozicion, se la afero postulos novajn oferojn de mi.

„Per la Societo mi salutas nian geesperantistaron.

Hr. Popov".

## Zamenhof-Monumento.

Ni ricevis la raporton de la Organiza Komitato por la konstruo de la Monumento sur la tombo de Dro Zamenhof adresita al la XV U. Kongreso en Nürnberg.

El ĝi ni donas jenan eltirajon:

El la prezentitaj al konkurso verkoj por la monumento unuan premion ricevis tiu de s-o Lubelski. La konstruo komencos senprokraste uzante graniton el Skotlando. Laŭ propono de la Varsovia Komitato por la konstruo, sur la flankoj de la monumento esfos akceptataj surskriboj de ĉiuj naciaj esperanto-societoj kontraŭ certa pago, difinota de la organiza komitato.

La monkolekto iras tre malrapide, — ĝis nun estas kolektita sumo de 165 strl. kaj estas necesaj 220—240 L.

Ni atentigas la samideanaron, ke ĉe Bulgara Esperantista Societo estas speciala fondo por monkolekto por la Monumento de nia majstro: ĝis nun estas kolektita sumo de 600 levoj nur de la Sofiaj esperantistoj. Donacoj estas ricevataj de ĉiuj, por ĉiu monsendo de 20 levoj la oferinto ricevos specialan kuponon kun la portreto de la Majstro.

Oferu samideanoj!

## ESPERANTO-MOVADO.

### Enlanda.

— Grandan akcelon al la tuta enlanda movado donas la sciigo, ke la XVI Universala Esperanto-kongreso okazos en la bulgara ĉefurbo.

La sofiaj esperantistoj en serio da kunvenoj pridiskutas la organizon de la kongreso.

La 4. sept. la Ministro-Prezidanto S-ro Al. Cankov akceptis deputacion de BES en konsisto: G. Aktarĝiev, Sim. Petkov, Petr Jordanov, At. D. Atanasov kaj Dim. Simeonov; al ĝi li deklaris, ke la registaro akceptas la kongreson, helpos mone la aranĝon kaj donos ĉian subtenon por la bona renkonto kaj gastigo de la fremduloj. Li prezentis pri tio specialan raporton al la Ministra Konsilantaro, kiu verŝajne baldaŭ okupos sin pri la kongreso kaj la ŝtata subteno al ĝi.

BES donis peton ankaŭ al la Sofia Urbestro, pri subteno al la kongreso. La urbestro afable promesis doni ĉian subtenon.

**Tirnovo.** La adreso de la Tirnova Esperantista Grupo „Lumo" estas: Georgi Donĉev, str. Gurko 389, Tirnovo.

— Malfermita kurso por geinstruistoj kun 20 partoprenantoj. La kurso daŭros de 1. aŭgusto ĝis 15. septembro.

La agado de niaj samideanoj estas gratulinda — eĉ dum la somero ili agadas fervore kaj senlace.

**Kazanlik.** Nia fervora samideano Ivan Sarafov, kiu pasigas sian libertempon en sia naskiĝurbo, malfermis kurson kun 15 kursanoj.

— Je la 27. aŭgusto okazis esperantista amuzvespero je kiu ĉeestis ankaŭ samideanoj el Stara Zagora, Ŝipka kaj Magliŝ-

**Slivnica.** Fondita nova grupo. Prez. Al. Antonov.

**Teliŝ.** Fondita grupo kun 20 membroj. Estraro: prez. Vasil Cankov, vicprez. Trifon Ivanov, sekr. Petr Petkov vicsekr. Geno Cvetanov kas. Vasil Stoicov.
Adreso de la grupo: Petr Petkov — Teliŝ.

**Pazarĝik.** La loka grupo „Verda Stelo“ aranĝis la 2 sept. ĝardenan amuzvesperon, dum kiu la milita muziko ludis „La Esperon“.

La sama grupo eldonis grandajn kaj bonajn afiŝojn kun propaganda teksto por la lerno de Esperanto.

**Nova Zagora.** Ankaŭ tie elkreskis jam grupo kun 10 membroj sub la gvidado de Anton Genov, instruisto ĉe la loka reallernejo.

## Alilanda.

**Конгреса на Християнския Интернационалъ и Есперанто.** На 19—26 юли т. г. въ гр. Ниборгъ Страндъ (Дания) се е състоялъ свѣтовния конгресъ на Християнския Интернационалъ. На този конгресъ сж били представени най разнообразни течения на християнската и хуманна мисъль. Между ораторитѣ личатъ имената: Ayles, единъ отъ лидеритѣ на Независимата Работнишка Партия въ Англия, професоръ Д-ръ Рагацъ отъ Швейцария, Валентинъ Булгаковъ, последния секретарь на Левъ Толстой, понастоящемъ екстерниранъ отъ болшевикитѣ и пребиваващъ въ Прага и много др. България е била представена на този конгресъ отъ г. Янко Тодоровъ отъ Пещера, бившъ редакторъ на сп. „Вегетариянски Прегледъ“. Предъ конгреса г. Янко Тодоровъ е говорилъ за „Войната и Мира“, като речьта си произнесълъ на Есперанто, нѣщо, което направило силно впечатление на онези конгресисти, които не сж били запознати съ езика; тѣ сж били поразени отъ звучностьта и яснотата на израза въ Есперанто. На край конгресътъ е приелъ следната резолюция:

„Християнскиятъ Интернационалъ приема Есперанто като единственъ езикъ при превеждане на речитѣ и диспутитѣ въ своитѣ конгреси, схващайки ясно, че съ Есперанто не само се облегчаватъ твърде много въ техническо отношение международнитѣ сношения, но че и въ езиково отношение се постига онова единство и примирение между хората, което съставя главната цель на християнския интернационалъ“.

— Презъ време на XV Универсаленъ Еспер. конгресъ въ Нюрнбергъ, между другитѣ частни събрания, се е състояло и това на *Международната Християнска Есперантска Лига*. Като делегатъ е присѫтствувалъ официаленъ представитель на грамадната организация: Всемиренъ Съюзъ на християнскитѣ съюзи на млади мѫже (Y. M. C. A.), която има 9000 клонове съ близо 2 милиона членове по всички краища на земята.

Официаленъ органъ на лигата ще бѫде „Dia Regno". Избра се акционенъ комитетъ отъ три лица: P. Hübner (Германия), H. A. Luyken (Англия), R. Horner (Швейцария).

---

# SCIIGOJ — ИЗВЕСТИЯ.

**До всички секции.**

Съобщава се на всички групи и членове, че новитѣ членски карти се приготовляватъ и въ скоро време ще бѫдатъ готови. Отделна карта ще струва 2 лева, по каквато цѣна групитѣ ще я заплащатъ предварително на д-вото. Групитѣ иматъ право да порѫчатъ карти и въ по-голѣмъ брой отъ броя на груповитѣ членове, само ако внесатъ предварително стойностьта на картитѣ. Всѣка карта носи пореденъ номеръ поставянъ отъ д-вото. Всѣка група отъ своя страна може да постави своя нумерация за своитѣ членове на втората страница на картата. Картитѣ сѫ валидни за една година, като ежегодно ще бѫдатъ заменявани съ нови. Всяка група може да определи за своитѣ членове и по общо съгласие друга цѣна на картитѣ, не по-голѣма отъ 3 лева. Съ картитѣ се изпращатъ на групитѣ и специални статистически листове. Всѣки членъ трѣбва да попълни единъ такъвъ листъ, който да носи номеръ еднакъвъ съ номера на членската карта. Попълнени тѣзи листове се изпращатъ въ д-вото. Членъ, който не е попълнилъ такъвъ листъ макаръ и да е внелъ членския си вносъ, ще се смѣта като нередовенъ. Вменява се въ дългъ на групитѣ най-точно да съблюдаватъ правилното попълване и редовното препращане на статистическитѣ листове, за да може да се създаде основа за една статистика на есперантското движение у насъ, каквото е липсвала до сега.

За събиране членскитѣ вноски се отпечатватъ специални марки, съ които ще се облепватъ членскитѣ карти и ще служатъ като квитанция за платенъ членски вносъ. Маркитѣ сѫ нагодени за събиране членския вносъ тримесечно съгласно устава на д-вото. Всѣка марка има стойность отъ 6 лева, като групитѣ ги заплащатъ на д-вото по 3 лева — по 1 лв. месеченъ вносъ — а остатъка отъ 3 лв. за всѣка марка остава като платенъ вносъ за самата група. По тоя начинъ всѣки членъ получава квитанция, че е платилъ 6 лв., групата задържа отъ тѣхъ 3 лв. за себе си, а другитѣ 3 лв. внася на д-вото като стойность на марката. Групи, които иматъ членски вносъ по-голѣмъ отъ 2 лв. месечно могатъ да взиматъ отъ членоветѣ си допълнителна стойность на маркитѣ.

Всѣка група порѫчва отъ д-вото известно количество отъ тѣзи марки съобразно числото на членоветѣ си, като може и желателно е да внася стойностьта им — по 3 лв — предварително, при порѫчката.

Маркитѣ за ученици сѫ по 3 лв. стойность и се заплащатъ на д-вото по 1·50 лв. При порѫчка групитѣ да упоменаватъ колко марки отъ по 6 и колко отъ 3 лв. желаятъ.

Безъ да се гледа на този начинъ на събиране членския вносъ, ще се държи точна сметка за всѣка група, колко членове има и колко-

марки заплаща. Д-вото си запазва правото да не изпраща предварително марки на групи, които сѫ се проявили до сега като неизправни.

Като обръщаме вниманието на всички върху важностьта на горнитѣ нареждания, молимъ всички най-внимателно да ги проучатъ и винаги да ги иматъ предъ видъ за най-точно изпълнение, за да се избѣгватъ недоразумения и нередовности, както и излишни обяснения съ писма.

**До групитѣ и лекторитѣ по Есперанто.**

Тъй като Министерството ва Народната Просвѣта ще назначава за лектори по Есперанто само представенитѣ чрезъ директоритѣ на гимназиитѣ лица, съгласно реда за назначаване на лектори, а не по представенъ отъ дружеството списъкъ, препорѫчва се следното:

1. Лекторитѣ, които сѫ учители въ гимназиитѣ, за които сѫ представени за назначение, да направятъ потрѣбното чрезъ дирекцията за вземане часове по Есперанто; за тѣхъ не е необходимо специално назначение;

2. Всички останали лектори да сондиратъ директоритѣ на гимназиитѣ като помолятъ последнитѣ да обявятъ на ученицитѣ, че ще се изучава Есперанто и ги подканятъ да се запишатъ като сѫщевременно поискатъ отъ Министерството на Просвѣтата назначението на лекторъ;

3. Групитѣ да проагитиратъ между ученицитѣ да се записватъ за изучаване на Есперанто.

Лектори ще бѫдатъ назначени само представенитѣ отъ директоритѣ лица, които сѫщевременно сѫ представени и чрезъ дружеството.

**До Лекторитѣ.**

Известява се на лекторитѣ по Есперанто, че съ заповѣдь № 4473 отъ 7. септември т. г. Министерството на Просвѣтата удобрява издадения отъ дружеството учебникъ по Есперанто „Курсъ по Есперанто за българи" отъ Ат. Д. Атанасовъ и го препорѫчва като рѫководство за срѣднитѣ училища.

**De la sekretariejo.**

La sekretario konigas al ĉiuj samideanoj ke li havas jam konstantan kancelarion — str. Pozitano 5, III etaĝo, ĉambro №44, kie la samideanoj venintaj el la provinco povas lin serĉi.

Pro okupateco li petas ke oni vizitu lin nur je okazo de laboro.

**De la redakcio.**

Въ българския текстъ на списанието ще се следва официалния правописъ. Статията „Есперантската кооперация" излиза по предишния правописъ, понеже бѣ набрана преди месецъ.

---

## Funebra rememoro.

La 27. de majo la morto rabis el niaj vicoj nian samideaninon

S-ino GACKA AL. DASKALOVA
el Loveĉ,

edzino de nia bona amiko Al. Daskalov. Niajn kondolencojn al la suferanta samideano!

La 12. de julio, j. k. en vil. Skrinjano (reg. Kjustendil) falis mortigita nia nova samideano

MINĈO JANAĈKOV.

Eternan pacon al li!

La 1. sept. en Sofio, la malsanulejo Aleksandrova, mortis

PETR V. ANGELIEV

eksbibliotekisto de la grupo „Verda Stelo" en Tatar Pazarĝik.
Per lia morto la grupo perdas unu el siaj plej fervoraj batalantoj. Eternan pacon al li!




СТ. ХИТРОВЪ
В.-ТЪРНОВО

изпраща веднага срѣщу прѣдплата:

ПЪЛЕНЪ УЧЕБНИКЪ по Есперанто, граматика, упражнения, христоматия и 2 еспер.-бълг. и бълг.-еспер. рѣчници . . . . . 20·—
СТЕНОГРАФИЯ AOPO пъленъ учебникъ, изучаема 3 часа. . . 6·—
ESPERANTIO, богато илюстр. еспер. двуседм. списание, излиза въ Берлинъ, абон. за 10 броя . 30·—
MIA AMIKO, читанка . . . 6—
HINAGO, отъ Джекъ Лондонъ. 5·—


## Koresponda fako.

S-o Franz Hieronymus, **Harburg-Elbe** (Germ.), Bremerstr. 57 deziras korespondi per L, Pl kun bulgaroj kaj orientanoj. Ĉiam respondas.

S-o W. Rusch, **Harburg-Elbe** (Germ.), Talstr. 4 serĉas gekorespondantojn per L, Pl. Ĉiam respondas.

До ____________________

____________________

____________________

# Българско Есперантско Дружество

**Доставя:**

Курсъ по Есперанто за българи. Ц. 16 лв. съ пощата 17 лв.
Международна конференция за Общъ Търговски езикъ въ Венеция . . . . . . . . . 5·—
Анкета за международ. езикъ отъ Ив. Х. Кръстановъ 5·—
Картички съ изгледъ на Търново по случай Х ия еспер. конгресъ. . . . . . . 0·50
Албумъ на българските есперантисти . . 30 и 50·—

Илюстровани есперантски картички, 9 различни видове, въ много ограничено количество. Цѣна 1 лв. парчето. Поржчки най-малко отъ десеть екземпляри.

**Приема обявления за чужди списания:**

„Esperanto Triumfonta" по 4 лв см².

**Абонирва за:**

„Pola Esperantisto" — 40 лв. год. абонаментъ
„Literatura Mondo" — 120 лв. годишно
„Esperantio" — 30 лв. за 10 броя, полумесечно
„Esperanto Triumfonta" — 4 лв. за брой, седмиченъ.

# Открива се подписка за V. годишнина на сп.

# „Bulgara Esperantisto".

**Годишенъ абонаментъ 30 лева.**

И презъ V-тата си годишнина „Bulgara Esperantisto" ще даде 12 печатни коли на читателитѣ си, при сжщия размеръ както и до сега.

Записвания ставатъ направо въ дружеството или чрезъ мѣстнитѣ секции.

**Redakcia Komitato:**
**At. D. Atanasov, Pan. At. Kolev**
**Dimitr Simeonov**
Adreso de la redakcio: Sofio (Bulg.), bul. Maria Luiza, 46.

София, Печатница „Либерални Клуб" — Б. А. Кожухаров Телефон 1984